


JEN-BULTENO

2 - 1969



## OFICIALA ANONCO

Jenas la rezulto de la estrara elekto de JEN, 1969:

Ricevitaj balotiloj	23
Jonathan Pool	22
Peter J. Benson	21
J. Brian McClafferty	20
Erik J. Felker	11
Mark Mandel	10
Michael Larkin	8
Arthur Morse	7
S. Neal Preston	1
Bengt-Anne Wickstrom	1
Tee Guidotti	1

Laŭ la jam farita decido ke la venonta Estraro havos 5 anojn, ili estos Pool, Benson, McClafferty, Felker, kaj Mandel. La deĵoro de tiu Estraro komenciĝos je 1 septembro, 1969.

JEN-BULTENO

2/1969

Redaktis:  
Robert Rothenmeyer

Materialonpor  
aperigo sendu al:  
Robert Rothenmeyer  
73 Old South Street  
Northampton  
Mass., 01060

ELNA-KONGRESO

La 1969-ELNA-Kongreso okazos en North Adams, la 17an ĝis la 20a de julio. North Adams estas urbo en la bela Berkshire-Montetaro de Okcidenta Massachusetts.

D-ro Mario Pei, vaste konata lingvisto, prelegos. Estos ekskurso al la proksima muzik-festo de Tanglewood kaj elektebla neformala antaŭ-kongreso sur la supro de Mt. Greylock, la plej alta monto en Massachusetts. Multaj aliaj distraĵoj estos planataj. JEN penos uzi okazon por interesi neesperantistajn junulojn ĉe la kunveno pri Esperanto.

---

SUR LA KOVROPAGO: La JEN-estraro ekiras al la ELNA-Kongreso, 1969.

JEN-INTERVJUO:

Denis LeCam (interparolo kun juna Esperanto-parolanto)

JEN: Menciu ion pri viaj propra historio kaj nuna okupo.

LeCam: Mi estas studento ĉe Liceo El Cerrito diplomigonte en 1970. Post tiam mi vizitos la Universitaton de Kalifornio. Mi naskiĝis en Berkeley, Kalifornio, kaj loĝis tie aŭ en la proksima komunumo Kensington dum mia tuta vivo, krom dek monatoj en Francujo kiam mi havis kvin jarojn. La patro, profesoro pri statistiko, insistas ke mi estu ia matematikisto aŭ sciencisto, sed mi volas labori pri lingvoj. Dum la somero de 1969 mi studos la grekan lingvon koresponde, kaj se tio bone rezultos, mi probable elektos klasikajn lingvojn kiel ĉefobjekton.

JEN: Kiel vi eksciis pri la ekzisto de Esperanto?

LeCam: En printempo 1967, dum mi trarigardis diversajn verkojn pri lingvoj en la loka biblioteko, mi hazarde trovis la Army Field Manual (Armea Praktika Manlibro) pri Esperanto. Bedaŭrinde ke estis nur tiu aĉa libro, sed la simpleco tamen trafis min, do mi petis de la bibliotekistoj pluajn informojn pri la lingvo. Post multaj senfruktaj provoj, mi fine kontaktis la libroservon de la okcidenta marbordo kaj eltrovis la veran valoron de la lingvo.

(3)

JEN: Kiam kaj kiel vi lernis ĝin?

LeCam: Post mendi Step by Step in Esperanto de la libro-servo, mi penis mem studi la Internacian Lingvon, kaj, pro la facileco de la lingvo kaj mia dezirego ĝin lerni, mi komencis frue en 1968 skribi per ĝi en mia taglibro. Tiel lerninte ĉiutagajn vortojn, mi komencis legi simplajn novelojn.

JEN: Kial vi lernis ĝin?

LeCam: Pro lingvointereso, plejmulte. Mi ne estis idealisma esperantisto, ĝis kiam mi lernis pri la movado ĉe la regionaj kunvenoj en San Francisco. Antaŭe mi nur traktis ĝin kiel iun ajn alian lingvon -- mi antaŭe provis lerni la japanan.

JEN: Kio okazas pri Esperanto-aferoj en via loko? Kian rolon vi ludas?

LeCam: Ĉe Liceo El Cerrito, kiun mi vizitas, Esperanto-klubon organizis mi mem komence en Marto 1968, sed damage mankas intereso tie. La klubo ankoraŭ ekzistas: je la nuna momento ĝi celas nur instrui la lingvon al kelkaj liceanoj -- eble en la aŭtuno ĉeestos ĝin sufiĉe da veraj esperantistoj por ebligi aliajn agadojn. Por la junulara filio de la regiona organizaĵo SFERO mi nun redaktas la bultenon La Golfeta Esperantisto, kiu eldonigas proksimume kvinfoje jare.

(4)

JEN: Ĉu vi havas aliajn interesojn?

LeCam: Nu, mi interesigas pri klasikaj arto kaj muziko sed estas nek artisto nek muzikisto. Mi interesigas ankaŭ pri naturo, sed mia plej grava intereso ja estas la Internacia Lingvo.

JEN: Kion vi proponus por plipopularigi aŭ sukcesigi Esperanton?

LeCam: Se mi scius, kiel popularigi Esperanton, mi jam farus tion.

#### BONVOLMESAĜO DE LA JUNULARO DE KIMRUJO

La unua Bonvolmesaĝo de la Junularo de Kimrujo estis brodkastita en 1922, laŭ ideo de Pastro Gwilym Davies. De post 1924 oni elsendis la mesaĝon la 18an de majo ĉiujare, kaj ricevas pligrandiĝantan kvanton de respondoj. Komence brodkastita en Kimrujo, ĝi nun elsendiĝas en multe da landoj kaj estas tradukita en multe da lingvoj, inkluzive Esperanton. Lastjare, la Esperanto-mondo sendis inundon de respondoj (Skribu al Swyddfar Urdd, Aberystwyth, Wales, U. K.!). Jen la Kvardek-oka Bonvolmesaĝo de la Junularo de Kimrujo al la Junularo de la Mondo, radie disaŭdigota je Bonvoltago, 1969:

(5)

Jen Kimrujo! La geknaboj de Kimrujo alvokas la geknabojn de la Mondo, je Bonvoltago.

Malgranda kaj montara estas nia lando, kun profundaj lagoj kaj produktaj valoj; lando kun sia propra lingvo -- unu al la plej malnovaj en Eŭropo.

Per ĉi tiu lingvo kaj la tradukoj, ni hodiaŭ elsendas nian Bonvolmesaĝon. Kaj malgraŭ niaj diversaj lingvoj, ni invitas vin, niajn kunulojn, kuniĝi por proklami unuvoĉe, ke ni insistas paroli la lingvon de amo, de justeco, kaj de reakordiĝo. Ni petas kuragon por paroli tiel, malgraŭ perforto kaj subpremo, kaj responde al la krioj de la malsatuloj kaj malriĉuloj. Ankaŭ ni petas kuragon por ke niaj vortoj iĝu agoj— praktika helpo al tiuj organizaĵoj jam strebantaj por forigi la kialojn de milito kaj ĝiajn malbonajn rezultojn.

Tiele, ni povas esperi pri mondo en kiu neniu nacio estos subpremata de alia, pri mondo kie frateco regos anstataŭ milito, amo anstataŭ malamo, kaj justeco anstataŭ tiraneco.

Dear Sir:

I am a businessman in the early American furniture business. I wish to learn Espanto in preparation for a contemplated sales trip to the Espanto speaking countries. Please enroll me in . . .

Dear Sir:

I am a senior in Monte Video Country Day Boys High School. I am the president of my class, the president of the Monte Video Country Day Chapter of the National Honor Society, star football player (quarterback) and member of the debate team. Our librarian says the so-called "international" language Esperanto is a dead language because it never had talented people in the movement. I want to give Esperanto a new lease on life. Please enroll me as . . .

Dear Sir:

I am a mother of 6 and my husband is sick in bed all the time. The government doesn't give me hardly any welfare. I have been told by a neighbor that you give free milk to people like me so I can feed my children. Please tell me how to get your free milk. Thank you and God Bless you . . .

Kara Kavaliro:

Mi estas nun 60 kaj mi havas studas Esperanto 30 jaroj antaŭ. Kelke tagoj antaŭ mi vidas advertisemento por Esperanto en magazeno kaj nun volas studas ĝi tre multe da. Plaĉas sendas mi via curso for "advanced" studentoj. Danko tre multe . . .



(7)

Dear Sir:

I am a teacher of the French Language (langue Française) in Benton Heights Municipal High School. I always feel that it is important that the children should learn something about culture in a Foreign Language class, and so of course I always try to instill in them an appreciation of the roots of their own American culture in France by showing slides of French furniture, reading to them about French Civilization, and other Methods. However some of the teachers in our school said that you are promoting the teaching of a language called Peranto in the high schools. From what I can gather, it is a totally ARTIFICIAL language which has no culture at all! I need hardly say that our objectives in teaching the Great Cultural Languages of our Western Heritage would hardly be served by . . .

Dear Sir:

I am a Sophomore in Buckeye State College. I have to do a 15-page paper for my Language Arts class and my teacher has approved the topic "The Inside Facts About Esperanto." Please send me any material you may have for free about Esperanto. The material has to be in English, unfortunately, since I do not read . . .

Dear Sir;

We are delighted to learn of your decision to hold your next annual convention in Miami. For years we at George Rothstein and Sons, Caterers, have played host to the most successful conventions in Miami. Our Hotelpac arrangement provides all that is needed for the small convention of five

(8)

or six thousand participants, to the largest national meetings. It includes hotel accommodation, paper hats, flags with your company or club emblem, convention buttons, souvenir button-vests, and . . .

Dear Sir:

I am a retired businessman who has just left a career of over half a century in the service of the Mullins Rubber Belt, Valve, Washer and Gasket Corporation. I am not rich but halve a modest income and my retirement pay and I have decided to spend these last years on charitable projects for the improvement of the Human Community. Accordingly I am sending one hundred twelve-man inflatable emergency life rafts to help you in your charitable work. I would be very pleased if you could include my name in your list of benefactors in your . . .

#### KONGRESO DE TEJO

La 25a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazos ĉi-jare en la Sveda urbo Tyresö. Tyresö, antaŭnelonge kampara komunumo, estas nun antaŭurbo de Stockholm, plenigita pro la granda manko de loĝejoj en Stockholm. Krom doni al la partoprenantoj la eblecon konatiĝi kun interesa antaŭurbo -- kiu kelkfoje estas uzata kiel ekzemplo de bona urboplanado, aliffoje kiel abomenindaĵo -- la kongres-komitato pretigas riĉan programon por la kongresa semajno. Tio inkluzivas festparolon de Humphrey Tonkin, filmojn, elekton de "Fraŭlino Esperanto," ekskursojn, diskutojn pri "Junularo kaj Socio," konkurson, kaj aliajn distraĵojn.

La Reĝo de Umo

Jen belega Umlando  
super kie mi estas  
sole reganta



Via alta moŝto volas diri  
„estas reginta,” ĉu ne?

Ne, kontraŭe,  
mi NUN estas  
reganta



Do, via alta moŝto estas  
reginta, ĉu ne, ĉar jam de  
antaŭe komencinta regi  
estas.


Ĉu mi do devus  
esti estinta  
regi?




koncepto de la reĝa privilegio

Mi supozas, ke vi estas  
povanta esti estadanta  
esti estadinta kaj  
espereblante estadanta  
esti reganta


Ĉu?



Sed se vi estus povanta  
estiestadanta esti  
estadanta post kiam vi  
ekestus estadinta  
regad...



la Papo...



Mi Regas!



JEN

akre

sentas

la pardon

de la Usona U.E.A. Cefdelegito

DONALD E. PARRISH

*kiu mortis la pasintan printempon*

kaj esprimas sian kondolencon al lia familio

La jenaj cinkvencoj estis verkitaj de gelernantoj en somera kurso en San Mateo, Kalifornio, post vojaĝo al la Japana Kultura Centro en San Francisco. Ili estis studintaj Esperanton po dek minutojn en tago dum kvin semajnoj.

Lernejoj\*  
Infanoj studas  
Instruistoj helpas ilin  
Oni skribas alimaniere  
Skribado

\*en Japanujo  
Martha Bernal  
9-jara knabino

Pagodo  
Bela Pagodo  
Agrabla kolora Pagodo  
Beleta Kvin-tegmenta Pagodo  
Gracia

Amy Goldman  
9-jara knabino

Ostroj  
Estas konkoj  
Ili havas perlojn  
Homoj gardas ilin bone  
Japanujo

Eric Wahlsstron  
9-jara knabo

Te-Domo  
Unu ĉambro  
Preskaŭ neniu meblaro  
Riza papero sur fenestroj  
Malgranda

Dean Balco  
9-jara knabo

(10)

Perloj  
Sub akvo  
Blankaj kaj Belecaj  
Ili estas tre multekostaj  
Belegaj  
Donna Robb  
11-jara knabino

Katoj  
Ili grimpas  
Ili kuras rapide  
Ili estas tre saltetaj  
Lertaj  
David Lee  
8-jara knabo

Hipulo  
Estas odoraĉa  
Havas longan haron  
Loĝas en San Francisco  
Freneza!  
Marc Kennedy  
10 Jara Knabo

(11)

Karpoj  
Movas malrapide  
Kun arĝentemaj naĝiloj  
Blovas bobelojn de aero  
Lacece  
Edmund Johns  
10-jara knabo

Pac-pagodo  
Libereca loko  
Haltu la bombadon  
Bonvolu halti la mortigadon!  
Nun!  
Garry Vaght  
9-jara knabo

Parfumo  
Odoras bele  
Venas en vitro  
Flaras simile al rozo  
Romanco  
Tami O'Rourke  
9-jara knabino

Kiam mi pensadas pri la astronautoj de Apollo 8, mi ne povas ne miri. Granda sukceso tiu vojaĝo estis -- por la scienco! Sed por la homaro? La astronautoj legis el la Biblia libro Genezo. La usona ateistino, Madalyn Murray O'Hare, multe koleris. Ankaŭ mi koleris, sed pro malsamaj kialoj. La plejparto de la homoj verŝajne ne konstatis, ke tiu legado estis (laŭ mia opinio) ia komuniko al Sovetunio. La astronautoj kvazaŭe diris, "Rimarku, rusoj! Nun ni antaŭas vin en la spackuro. Tio pruvas, ke Dio ekzistas!" Sed multaj homoj, kaj en Usono kaj (precipe) en aliaj landoj, ne akceptas Genezon kiel sanktan libron. Verdire, mi multe estus preferinta, ke la vojaĝoj ĉirkaŭ la lunone okazu dum Kristnasko. Sed mi estis precipe malkontenta, ke la astronautoj sendis siajn bondezirojn nur en la angla lingvo. Kial ili ne sendis bondezirojn multlingve -- inkluzive Esperante? Ni ne forgesu, ke ili ĉirkaŭigis la teron kaj la lunon -- ne Usonon. Ili mem diris, ke la tero aspektas bela oazo en la spaco. La tero, ne iu ajn lando!

Mi malfeliĉigis, kiam mi vidis sur la televido grandan USONAN flagon por bonveno. La tero estas unu planedo -- "spacoŝipo," laŭ la esprimo de Barbara Ward. Kaj la homaro estas nur unu. Ĉu la vojaĝo de Apollo 8 ne pruvis tiujn faktojn -- aŭ almenaŭ pliklarigis ilin? La pluraj religioj emfazas la unuecon de la homaro; la sciencoj, ankaŭ. Sed kiam oni surteriĝos sur la lunon (kio okazos post ne multaj monatoj, tre ŝajne), oni surmetos USONAN (aŭ SOVETAN) flagon -- ne teran flagon! Estas bedaŭrinde, ke ni ne havas planedan flagon. La UNO-flago ne taŭgas. Mi ne pensas pri nacioj sed



pri homaro kaj planedo. (Pro tio, mi preferas la vorton "universala" anstataŭ "internacia" rilate al la lingvo Esperanto.) Ni bezonas terflagon. Kia, aŭ kiel, ĝi aspektus? Nu, la uzataj koloraj por flagoj estas ruĝo, bluo, verdo, blanko, kaj (multe pli malofte) flavo kaj nigro. Kial ni ne havu flagon konsistanta el triangulaĵoj aŭ strioj tielkoloraj? Ekzemple: nigra strio simbolus la kosmon, el kiu ni estas parto; blanka strio simbolus la sunon, de kiu ni dependas por la tera vivo; blua strio simbolus la ĉielon kaj la akvon; verda strio simbolus la plantan vivon (kaj la esperanton!); ruĝa strio simbolus la bestan kaj la homan vivon (ĉiuj homoj havas ruĝan sangon). Mi estas konvinkita, ke ni devas surmeti TERAN flagon sur la lunon -- kaj sur la teron!

Mi ankaŭ ne povas ne rimarki, ke dum tiu ĉi monato (januaro) ĉiuj alilandanoj loĝantaj en Usono devas plenigi adreskarton kaj doni ĝin al la registara enmigra fakto. Tiu leĝo ekzistas ekde 1952. Ĝi estas stulta leĝo. Tiaj konceptoj -- civitano, alilandano aŭ fremdulo, kunligano, kontraŭulo, "samideano" (je larĝa senco), herezulo -- tute ne taŭgas! Ne forgesu: mi skribas ne pri nacioj sed pri nacieco. La astro-naŭta vojaĝo kaj la fakto, ke mi ricevis bondezirkartojn el pli ol dudek "fremdaj" landoj, pli kaj pli konvinkis min. Kaj ni ne forgesu la Olimpiajn ludojn (kiuj laŭsupoze estas konkuradoj inter individuoj, ne nacioj), la vjetnaman militon, la okazaĵojn en Ĉeĥoslovakio, la situacion en la Mez-Oriento, ktp.

Finfine, mi rimarkas, ke eĉ "radikaluloj" kaj "hipioj" ne ŝajnas havi universalan senton. Kial ili ne postulas kaj kreas flagon por ĉiuj, por la tuta homaro? Kaj kial ili ne lernas Esperanton? La plejparto da usonanoj, kaj aliaj, ne scias, ke 1968 estis la Internacia Jaro de Homaj Rajtoj! La plejparto da homoj ne konceptas sin kiel anojn de la homa raso kaj de la terplanedo.

Nia nova aliĝilo, "Close the Gap," estas ja tre, tre bel-aspekta -- simile belaspekta al nia propagandilo, News Digest.

Mi rimarkis sub la rubriko "Membreco" de la ĵusa "Raporto al la Membroj" jenon: "Malgraŭ nia tre vasta agado (News Digest nun distribuigas en 2000 ekzempleroj) la membronombro restas terure malalta. Do, ne nur aliĝu mem por 1969, sed trovu kelkajn novajn anojn por JEN!"

Mi kuraĝas sugesti (ja nenio nova) ke nia organizaĵo similas aŭtomobilon ĉe aŭtovendistejo, kaj la aŭto havas tre glatan, novan farbon; alte poluritan kromon; novajn pneŭmatikojn. "Venu kaj aĉetu," diras la vendisto. "Nur \$200." "Do bone," iu diras, "ŝajne ja bona prezo; do mi aĉetos." Tiam la aĉetinto malfermas la pordon por eniri kaj sidigi, kaj li trovas... lignan skatolon por sidejo, paneeman motoron, preskaŭ nenion alian.

Sendube vi vidas la analogion: JEN aperigas ĉi tian beleĝan eksteron per la ND kaj nia nova "CTG"-aliĝilo, sed se iu senzorge ja aliĝas, li trovas... nur unu malgrandan, paneeman, mimeografitan gazeton; kaj ĝis tre lastatempe, eĉ ne tion. Ĉu iu povas miri ke ni ne logas pli da homoj -- eĉ jamaj esperantistoj -- al aneco?

Nu, kion alian oni povus fari? Ja nia membraro estas tiom disvastiginta ke persona kunigado ne eblas, krom eble en mal-multaj urbegoj, kie hazarde troviĝas pli ol unu membro. Ŝajnas al mi sekve ke, pro neceso, nia ĉefa agado devus esti en la kampo de skribita servado al niaj propraj membroj. (La JEN-Bulteno en ĝia nuna formo estas bona komenco, sed nur komenco!). Se eble, ni povus ankaŭ arangi tutkontinentajn kongresojn, sed

tio estas malpli grava afero ol kontinua Esperanta nutrado al la membraro, kaj tio, kompreneble, povas esti (por nia organizaĵo) nur skriba. Sen tio, neeviteblas, ke velkos la intereso de niaj anoj, kaj sekve JEN mem velkos.

Ni ne kontentu esti nur propaganda organizaĵo. Se ni sukcesos vere servi al ni mem, tio per si mem estos la plej bona propagandado por varbi novajn anojn.

Peter J. Benson  
23 Mardrew Road  
Baltimore, Md. 21229

LA PATRO DE LA RENASKIĜINTA HEBREA LINGVO (1)

Michael Iarkin

La hebrea nuntempe interesas ĉiujn edukitajn homojn, ĝenerale pro du ĉefaj kialoj. Unue, ĉar en vortoj de tiu antikva parolo estis originale skribita la plej bone konata, plej ofte vendata, verko el la tuta literaturaro de la mondo -- la Malnova Testamento de la Biblio.

La dua kialo estas preskaŭ du milionoj da homoj loĝantaj en la nova, eltombigita nacio Israelo, kies lingvo estas la hebrea.

Por ni Esperantistoj estas ankaŭ tria grava kialo. Estas rakonto pri nura liturgia idiomo, ĉe multaj aspektoj malvortoriĉa, kiu, precipe pro la senĉesa laboro de nur unu viro, estis refarigita, modernigita, en la vivantan lingvon de nova ŝtato. Oni povas trovi multajn paralelojn inter la problemsolvoj de tiu kaj nia lingvo, eĉ per la fakto ke ambaŭ ricevis la spiron de vivo pro la grandeco de nur po unu homo. Ja ekzistas pripensindaj similecoj inter la savinto de la hebrea --

Eliezer Ben-Jehuda, kaj nia propra Zamenhof. Sed antaŭ la fondo de la moderna Israelo, estis du ĉefaj judujoj -- la Centra kaj Orienta Eŭropo, kaj la lando ĉirkaŭ la Mediteranea Maro. Judoj en la Centra kaj Orienta Eŭropo, kutime parolis la jidan lingvon; eble la lingvon de la loĝloko; kaj ankaŭ, preskaŭ certe, iom la hebrean. Sed la hebrea estis uzata nur por legi la sanktajn verkojn, kaj la fakta gepatra lingvo estis la jida. Ĝi kreskis el speco de la germana kiu estis parolata en la Rejnlando dum la dekunua jarcento far judoj kiuj eliris Francujon pro religia maltoleremo. La jida, kies nomo devenas el la germana vorto "Jude" (germane ĉiuj substantivoj estas majuskligitaj) kiu signifas "judo," estas skribata hebrelitere.

Tiu lingvo bone servis por plenumi la ĉiutagajn bezonojn de sia parolpopolo. Tamen, kiel nura parolmaniero ĉiutaga aŭ "mamelosĉen" (lingvo de panjo), ĝi ne havis multege da respekto de sia parolantoj. Tion oni rezervis por "Laŝon ha-kodeŝ" la sankta lingvo. Ankaŭ, la jida, bedaŭrinde, estis vorte malriĉa ĉe teknikaj vortoj, kaj ĝis nia epoko ne havis tre gravan literaturon, ĉu originala aŭ tradukita (antaŭ kelkaj jaroj eĉ ne estis traduko de la Biblio en la jida, kvankam nun usona jidisto fine verkis tion). Eĉ hodiaŭ la jida ne havas oficialan gramatikon. (F-ino Marjorie Boulton en sia verko Zamenhof -- Creator of Esperanto informas al ni ke iam Zamenhof prilaboris tion sed neniam finis ĝin.)

Judaj loĝantoj ĉirkaŭ la Mediteranea marbordo uzis aliajn lingvojn ol la jida de siaj nordaj fratoj. Iliaj lingvoj estis multaj, sed el ĉi aro, la du plej gravaj estis hebreigita formo

(17)

de la araba en kiun oni tradukis multe da valoraj arablingvaj verkoj sciencaj, ktp, kaj tiel ĉe helpis plue riĉigi la sanktan hebrean kaj vorte kaj gramatike; kaj alia nomita Ladino, kiu estas malnova formo de la kastila (hispana). Ili ambaŭ estas skribataj hebrelitere. Ladino estas pli kompleta lingvo ol la jida, antaŭ longe oni tradukis la Bibliion en ĝin. Tamen, Ladino neniam disvastigis tiel multe kiel la jida.

Je la alveno de la dek-naŭa jarcento kaj la Industria Revolucio, preskaŭ ĉiu, almenaŭ en Norda Eŭropo, komencadis plibonigi la vivon, kaj la judoj ne estis escepto. Ili spertis grandan kulturalan renaskiĝon. Tiu okazadis unue en kaj ĉirkaŭ Germanujo, sed baldaŭ disvastigis ankaŭ al la judoj en Orienta Eŭropo.

La jida ekfloradis kaj aŭtoroj penis krei originalan jidan literaturon. Ili iome sukcesis, sed pro la malrespekto sentita pri la "malmelosĉen" kaj pro la malfacilaĵoj kaŭzitaĵoj pro manko de gramatiko kaj sufiĉe granda aro da vortoj agnoskitaĵoj inter ĉiuj jidparolantoj, la lingvo ne povis servi la judan kulturalan renaskiĝon tiel bone kiel estis bezonite; kaj la aliaj "judaj" lingvoj ne povis tiel servi ĉar ili ne estis sufiĉe disvastigitaj. Do, kiu lingvo povus esti la bezonata interjuda lingvo? La sola solvo estis la antikva hebrea, malgraŭ siaj mankoj, la sola komuna lingvo inter ĉiuj judoj, la lingvo de la verkoj sanktaj, la parolo de Dio. Kontraŭ tiel respektita, majesta, grandioza fratino la aliaj ne povis konkuri.

(La dua, kaj fina, parto sekvas en la venonta JEN-Bulteno)

(\*\*La jena artikolo estas la unua sendita al ni laŭ plano por interŝanĝi artikolojn inter la brazila kaj usona Esperanto-junularoj. Ĝi unue aperis en Impulso, organo de la Brazila Esperantista Junulara Organizo.)

Enmeze de la nuna produktado de filmoj en Brazilo, ekzistas movado, kiu povas esti konsiderata kiel ekflagro de nacia kin-konscio. Tiun movadon kelkaj insistas nomi "Nova Kino".

Brazila Nova Kino ne eksplodis interne de la kinĉambroj sen ia kialo, ajnmaniere. Krom la ŝanĝo aŭ renovigo, kiujn trairis la kino laŭ monda vidpunkto, la pli profunda kono pri niaj problemoj, matureco de la publiko kaj industriigo kreis kondiĉojn, por ke tiu aperu kino vere "nia", malsama al ĉio, kion ĝis tiam oni faris.

La filmo, kiu praktike malfermis la nov-kinajn vojojn, estis "Rio 40 Graus" (Rio 40-grada) de Nelson Pereira dos Santos. En artikolo por la Franca kinrevuo "Positif", Gláuber Rocha diras ion al ni pri N. P. dos Santos kaj ties filmo: "Estis li, kiu unue faris filmon sendependan laŭ la entreprena vidpunkto -- Rio 40 Graus (1954-a) -- kaj tie oni trovas la unuajn politikajn poziciojn antaŭ la kolonieska situacio de Brazilo."

En lando, kia Brazilo, plena de konfliktoj, kontrastoj kaj mizeroj, la temoj estas grandegaj por ĉia arto. Nia literaturo estas vasta, kaj tekstoj por kino ne mankis. La

granda Brazilia problemo, kiu estas la nord-oriento, influis sur ĉiuj artaj fakoj kaj ne povus ne sentigi sin ankaŭ en kino.

Multaj direktistoj movis siajn kamerojn al la kamparo, al la interno de la nord-orienta regiono, kiu ĝis hodiaŭ, en kelkaj partoj, povas esti konsiderata kiel prototipo de feŭdisma socio.

Antaŭe, kino farata tie ĉi ne havis bonan tekniknivelon. Oni bezonis do temon sufiĉe dramecan por kompensi tian teknikmankon, kaj ŝatigi la popolon, donante ian komercan profiton. Grava filmo, kiu komencis tiun ĉi periodon estis "O Cangaceiro" (La Bandito) de Lima Barreto, inkluzive premiita en la Festivalo de Cannes. La filmo pri "cangeceiros" (speco de banditoj de nia nordorienta regiono) rapide komercigis kaj transformigis en ian specon de "Usonvakera" genro Brazilia.

Tuj aperis verkaĵoj bazitaj sur ĉi tiuj temoj, kiuj surprizis la pli intelektcan publikon, ĉar multfoje ili ne havis bonan komunik-kapablon kun la popolo. Ili estis kelkfoje iom hermetikaj filmoj. Kiel ekzemplojn oni citas: "Deus e o Diabo na Terra do Sol" (Dio kaj Diablo en la Lando de l'Suno) de Gláuber Rocha; "Vidas Sêcas (Sekaj Vivoj) de Néelson Pereira dos Santos, filmo konsiderata kiel la unua vera matura de l'movado; "A Hora e a Vez de Augusto Matraga" (La Horo kaj Ŝanco de Augusto Matraga) de Roberto Santos; "Menino de Engenho" (La Knabo de l' Kanplantejo) de Válder Lima, Jr.; kaj aliajn.

(20)

Oni povas diri, ke tie ĉi ekzistas konscia kino, ligita kun kaj partoprenanta en la vivo de la lando. Kino, kiu jam akiris propran teknikon, komencante de preskaŭ-improvizaĵo kaj ne de imitado al jam difinitaj skoloj; kino renoviganta valorojn estetikajn kaj moralajn.

LITERATURA GAZETO

(anonco)

Literatura Kajero estas nova ĉiumonata gazeto en Esperanto.

Literatura Kajero estas eldonata en Brazilo, kun internacia enhavo.

Literatura Kajero estas literatura gazeto, kiu aperigas ĉefe tradukitan prozon. Baldaŭ, depende de la nombro de abonantoj, ĝia lingva rubriko (konkordancoj, fakaj terminaroj, ktp.) fariĝos aparta suplemento.

Literatura Kajero volas ricevi viajn tradukojn, de usona kaj alilanda literaturo. Sendu ilin al la redaktoro, Henerik Kocher, Baltasar Lisboa 34, ZC-11 Rio de Janeiro, Brazilo.

Vi povas aboni al Literatura Kajero sendante la jarkotizon de \$3.00 al la usona peranto Humphrey Tonkin, 2131 Tryon Street, Philadelphia, Pennsylvania, 19146.





---

JEN  
4 Central Street  
Millers Falls, Mass. 01349

Return Requested  
Address Correction Requested

DATED MATERIAL

Non-Profit Organization  
U. S. POSTAGE  
**PAID**  
PERMIT NO. 5  
MILLERS FALLS, MASS.  
01349

